








# Nozibele kaj la tri haroj






 Tessa Welch  
 Wiehan de Jager  
 dohliam  
|| 3  
 Esperanto 



## Global Storybooks

[globalstorybooks.net](http://globalstorybooks.net)


### Nozibele kaj la tri haroj

 Tessa Welch  
 Wiehan de Jager  
 dohliam



This work is licensed under a Creative Commons  
[Attribution 3.0 International License.](https://creativecommons.org/licenses/by/3.0)  
<https://creativecommons.org/licenses/by/3.0>







Antaŭ longa tempo tri knabinoj eliris  
por kolekti brullignon.


Tiam ekkonsciis la hundo ke  
Nozibele trompis lin. Do li kuris kaj  
kuris la tutan vojon al la vilaĝo. Sed  
la fratoj de Nozibele atendis tie kun  
grandaj bastonoj. La hundo turnis  
sin kaj forkuris, kaj poste ĝi ne  
revidiĝis.

14


Varmegis, do ili iris malsupren al la  
rivero por naĝi. Ili ludis kaj ŝprucis  
kaj naĝis en la akvo.

3







Subite ili ekkonsciis ke estas jam malfrue. Ili rapidis hejmen al la vilaĝo.




Kiam la hundo revenis, li serĉis Nozibele. "Nozibele, kie vi estas?" li kriis. "Mi estas ĉi tie, sub la lito," diris la unua haro. "Mi estas ĉi tie, malantaŭ la pordo," diris la dua haro. "Mi estas ĉi tie, en la ĉirkaŭbarejo," diris la tria haro.




Kiam ili preskaŭ alvenis hejmen,  
Nozibele metis sian manon sur la  
kolon. Ŝia kolĉeno estis forgesita!  
"Mi petas, revenu kun mi!" ŝi petis  
siajn amikojn. Sed ŝiaj amikoj diris  
ke estis jam tro malfrue.




Tuj kiam la hundo foriris, Nozibele  
prenis tri harojn de sia kapo. Ŝi  
metis unu haron sub la liton, unu  
malantaŭ la pordon kaj unu en la  
ĉirkaŭbarejon. Tiam ŝi kuris hejmen  
laŭeble plej rapide.




Do Nozibele reiris sola al la rivero. Ŝi trovis la kolĉenon kaj rapidis hejmen. Sed ŝi perdiĝis en la mallumo.




Ĉiutage ŝi devis kuiru kaj balai kaj lavi por la hundo. Tiam, iun tagon, la hundo diris, "Nozibele, hodiaŭ mi devas viziti iujn amikojn. Balau la domon, kuiru la manĝaĵon kaj lavu miajn vestaĵojn antaŭ ol mi revenos."




Malproksime ŝi vidis lumon el  
kabano. Ŝi rapidis al ĝi kaj frapis ĝe  
la pordo.



Tiam la hundo diris, "Ordigu la lito  
por mi!" Nozibele respondis, "Mi  
neniam ordigis lito por hundo."  
"Ordigu la lito, alie mi mordos vin!"  
diris la hundo. Do Nozibele ordigis  
la lito.



Surprize al ŝi, hundo malfermis la pordon kaj diris, "Kion vi volas?" "Mi perdiĝas kaj bezonas lokon por dormi," diris Nozibele. "Eniru, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele eniris.



Tiam la hundo diris, "Kuiru por mi!" "Sed mi neniam kuiris por hundo antaŭe," ŝi respondis. "Kuiru, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele kuiris iom da manĝaĵo por la hundo.